



Aŭtistoj „armitaj”

**Katastrofa
reĝinotago**

**La sola
nederlanddevena papo**

La blua miraklo



MORTO de ARTiSTO

Anna Löwenstein

Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.

Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro...

Anna Löwenstein



MORTO de ARTiSTO

Paĝoj: 624; Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2008


Serio Stafeto n-ro: 33

ISBN: 978-90-77066-39-3

Prezo ĉe FEL: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be



Obamenaĵo, aŭ haladzo de socialisma aventurismo 10



Tiel historiistoj de la estonteco verŝajne nomos la nunan tragikan epokon de usona historio. Verdire, ekzistis antaŭaj registaroj, kiuj ekis socialisman aventurismen. Clinton kaj Bush (la filo), sekvante utopiajn ideojn, devigis bankojn rompi la regulojn kaj financi hipotekon...

Katastrofa reĝinotago 16



Reĝinotago en Nederlando kutime estas granda tutlanda festo. Ne nur subtenantoj de la Oranĝo-dinastio, sed ankaŭ la plimultaj respublikemuloj, ja efektive pli-malpli la tuta loĝantaro de la lando tiudate estas en festa etoso.



Gvidlibro por ksenofoboj 24

Ofte naciaj stereotipoj havas ian bazon en la realo. Kaj ofte eksterlandano povas vidi ion pli bone, ol la homoj, kiuj ĉiutage vivas en iu medio, kaj al kiuj ĉio en ĝi ŝajnas mem-evidenta.

politiko

BALKANIO	8
Naskiĝas du pliaj NATO-membroj	
ALBANIO	9
Nova leĝo pri malnova reĝimo	
UKRAINIO	9
Libero eble ne tro liberala	
OPINIO	10
Obamenaĵo, aŭ haladzo de socialisma aventurismo	

moderna vivo

JAPANIO	13
Parolas enketo, sed ne fremdlingve	
SAMSEKSEMO	13
Pununtoj politike punitaj	
INTERNACIA KUNLABORO	14
La blua miraklo	
UKRAINIO	15
Ovacioj, aŭ ĉu nur ovoĵ?	
NEDERLANDO	16
Katastrofa reĝinotago	
ŜOFORADO	18
Aŭtistoj „armitaj“	
ALBANIO/ĈINIO	18
Muro-plezuro	

medio

IRLANDO	19
Nova ekologia vilaĝo	

spirita vivo

BURUNDO	21
Fino de ramadano: ĉu festo de gejunuloj?	
La sola nederlanddevena papo	22
La vatikana ŝtato celebris la okdekan naskiĝdaton	23

libroj

Gvidlibro por ksenofoboj	24
Laŭdinda maskita faksimilo	25
Lingvofamilio, kiu ne ekzistas	26

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

kiel pagi vian abonon de monato?

► Rekto al la eldonejo ...

> Per via FEL-konto.
 > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
 > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen.
 > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
 > El Usono per ordinara usona ĉeko.
 > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validadon fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
 > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
 > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
 > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.
 Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	24	27	14,4	5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9	17
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5	9
Brazilo	EUR	24	27	14,4	5	9
Britio	GBP	39	42	23,4	4	7
Bulgario	EUR	26	29	15,6	5	9
Ĉeĥio	EUR	34	37	20,4	5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	40	70
Estonio	EUR	26	29	15,6	5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (or.)	EUR	46	50	27,6	5	9
Grekio	EUR	46	50	27,6	5	9
Hispanio	EUR	46	50	27,6	5	9
Hungario	HUF	6950	7750	4170	1340	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5	9
Israelo	EUR	42	45	25,2	5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1460
Kanado	CAD	76	80	45,6	9	15
Kipro	EUR	34	37	20,4	5	9
Koreio	EUR	42	45	25,2	5	9
Kostariko	EUR	24	27	14,4	5	9
Kroatio	EUR	26	29	15,6	5	9
Latvio	EUR	26	29	15,6	5	9
Litovio	EUR	26	29	15,6	5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5	9
Malto	EUR	34	37	20,4	5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Norvegio	NOK	398	430	238,8	45	73
Nov-Zelando	NZD	105	110	63	11	19
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22	36
Portugalia	EUR	42	45	25,2	5	9
Rusio	EUR	24	27	14,4	5	9
Serbio	EUR	25	29	15	5	9
Slovakio	EUR	26	29	15,6	5	9
Slovenio	EUR	34	37	20,4	5	9
Sud-Afriko	EUR	42	45	25,2	5	9
Svedio	SEK	466	499	279,6	49	86
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	15
Usono	USD	78	82	46,8	8	14
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5	9

► aŭ pere de peranto ...

> **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, 4/23 Albura Street, Battery Point Tas 7004, Australia. Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
 > **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
 > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
 > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
 > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
 > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
 > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
 > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
 > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoicejo@esperanto.fi.
 > **Franca:** Unuigo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
 > **Germanaj:**
 > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
 > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoftware@gmail.com.
 > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
 > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esparent@ismennt.is.
 > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
 > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.
 > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Reto: yan@storm.ca.
 > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Reto: esperanto@saluton.net.
 > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiaul@ice.co.cr.
 > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecības 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
 > **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Straznickas, LEA, a.k. 187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
 > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: esper_lu@geocities.com.
 > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
 > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
 > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
 > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
 > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
 > **Ruslandaj:**
 > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 > Mikaelo Ĉertilov, PF. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu.
 > **Slovenaj:**
 > Višnja Brankovič, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
 > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: beckford@telkomsa.net.
 > **Svedaj:**
 > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Timiga reto

Ne estas dubo, ke la plej moderna komunikilo, Interreto, alportis tre multajn utilajn kaj avantaĝajn eblojn, tutmonde. Ni ĉiuj, ankaŭ nia revuo, profitas multe de la reto. Sed ĝi bedaŭrinde ankaŭ enhavas riskojn nemalmultajn. Ĉar ĝi estas aperta por ĉiuj, ankaŭ misuzantoj kaj krimuloj profitas per ĝi. Timigas min, ke intertempe la misuzado atingas pli kaj pli vastajn dimensiojn. Ĉiu el ni ja konas la ĝenojn pro virusoj, trojaj ĉevaloj kaj – plej ofte – pro nedezirataj reklam-mesaĝoj (spamo). Tamen kontraŭ ili oni povas sin relative bone protekti. Sed estas tre multaj deliktoj kaj krimoj, kiujn ni apenaŭ povas eviti. Spite al ĉiuj avertoj homoj facilanime transdonas en la reton ekzemple siajn bankindikojn, tiel ke modernaj bankrabistoj sidas komforte hejme antaŭ sia ekrano kaj helpe de la reto ŝtelas la monon de aliaj. Kion fari kontraŭ fiuloj, kiuj en

la mondvasta reto denuncas, misfamiĝas kaj kalumnias homojn? Malicaj lernantoj ne nur ĉikanas kamaradojn, sed ankaŭ kompromitas siajn instruistojn. Novnazioj uzas la reton por ataki kaj ofendi homojn kaj por organizi siajn fiagojn. Teroristoj per la reto povas lerni, kiel konstrui bombojn – ktp ktp.

Lastatempe Germanion alarmis pluraj skandaloj pri misuzado grandstila: kompanioj spionis ret-leterojn de siaj dungitoj! Se tio okazus nur en konkreta okazo de suspekto pri ekzemple korupteco, oni ankoraŭ iel povus kompreni. Sed se kompanio sen iu suspekto spionas ĉiujn siajn dungitojn, tio neniel estas tolerable.

Plej abomeninda tamen por mi estas la amasa krima uzado de la reto por infan-pornografio. Certe, tia naŭza misuzo de senkulpaj infanoj ekzistas jam delonge, sed nun, helpe de la reto, ĝi fariĝis preskaŭ amasfenomeno. Fakulo klarigis, ke nur per la

reto interŝanĝado kaj vendado de pornografiaj fotoj povis atingi tian gigantan dimension. Senprobleme, fulmrapide kaj mondvaste la krimuloj povas kontentigi sian perversan fantazion. La polico praktike ne kapablas vere persekuti tiujn krimulojn, jam pro la giganta nombro de perversuloj. Simile politikistoj ja povas fari unu leĝon post alia por malfaciligi la fian metion, sed la krimuloj ĉiam trovas novajn vojojn kaj eblojn por daŭrigi sian abomenindan agadon kaj komercadon. Cetere ni povas esti certaj, ke pro la granda postulado en la reto oni nun misuzas multe pli ol antaŭe infanojn por pornografio. Jen la malbelega parto de la reto. Sed ĉu pro tio ni rezignu pri ĝiaj avantaĝoj? Certe ne, sed estas timige, ĉu ne?

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 30a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.
Telefono 440-646-1482.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzon oni ne sendu al la redaktoro propriniciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe
Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio
aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.

Mirakloj mankas

de Stefan MAUL

Kiam la malgrandaj landoj Aŭstrio kaj Hungario malpermesis kultivadon de maizo „*Mon810*“, la usona agrarkompanio *Monsanto* ne reagis; sed nun malpermesis ĝin ankaŭ granda lando de Eŭropa Unio (EU), Germanio. Tuj *Monsanto* aliris tribunalon por ke tiu nuligu la malpermeson, ĉar kompreneble estas grava bato por la kompanio, ke la plej granda kaj industrie grava lando de EU rifuzas genteknike manipulitan *Monsanto*-maizon. EU ja ĝenerale toleras kultivadon de tiu planto, sed same toleras, se per bonaj argumentoj EU-lando ne permesas ĝin. Do oni povas atendi, ke *Monsanto* ne venkos en la proceso. EU intertempe aprobis la malpermesojn en Hungario kaj Aŭstrio, do ĝi apenaŭ povas agi alimaniere pri Germanio.

Kontraŭ maizotineo

Sed ĉu tiu maizo ne estas mirakla kreskaĵo? Ĝi enhavas genon, kiu protektas la planton kontraŭ damaĝoj, kiujn kaŭzas eta tineo kun la scienca nomo *Ostrinia nubilalis*. Ties raŭpo manĝante al si vojon tra la tigoj de maizo aŭ lupolo kavigas la planton, kaj sekve de tio la tigoj rompiĝas kaj la planto mortas. Do per sia genteknika truko *Monsanto* garantias pli grandajn rikoltojn. Sed kial ne ĉiuj kultivistoj akceptas tian helpon kontraŭ maizotineo? La problemo estas, laŭ sciencaj studoj uzataj de la germana registaro, ke la veneno de la enplantita geno povas damaĝi ne nur la malbonan tineon, sed ankaŭ mortigi larvojn de la ĉarmaj kaj utilaj kokcinoj, same abelojn kaj organismojn en akvoj.

Tamen kial aliaj landoj, precipe Usono mem, Brazilo, Argentino kaj Ĉinio ne nur toleras, sed favoras kultivadon de la *Monsanto*-maizo? Ĉu tie



Kiom grandaj estas riskoj kaj danĝeroj pro gentekniko, tion nuntempe neniu povas diri definitive.

oni ne timas riskojn aŭ ĉu oni simple neglektas ilin? En tiuj landoj ankaŭ aliaj genteknike manipulitaj plantoj estas jam delonge amase uzataj, ekzemple sojofaboj kaj kolzo. Sed en Eŭropo skeptiko kaj rezisto kontraŭ genteknike ŝanĝitaj plantoj estas granda. Rifuzas ilin ne nur multaj bienistoj, sed precipe grandnombre la konsumantoj.

Granda skeptiko

Aparte granda estas la skeptiko en Germanio. Laste en la sud-germana regiono Algovio (apud la Alpoj) en unu distrikto 1600 el ĉirkaŭ 2200 terkultivistoj faris kontrakton, laŭ kiu neniu el ili uzos genteknike manipulitajn semojn kaj bestonutraĵon. Tio gravas, ĉar en tiu regiono oni produktas precipe lakton. Ĝis antaŭ nelonge iuj asertis, ke praktike ne plu ekzistas nutraĵ-faruno por bovinoj sen gen-sojo; sed la Algovio-bienistoj klarigis nun, ke ili povas elekti inter dek du ofertantoj de bovo-nutraĵo ne genteknike miksitaj. „Ni terkultivistoj konscias

pri nia respondeco. Ni volas konservi nian pejzaĝon kaj niajn bestojn tiaj, kiaj ili estas, kaj protekti nin kontraŭ nekalkuleblaj riskoj“, diris proparolanto de la distrikto.

Ne ekzistas pruvoj

Kiom grandaj estas riskoj kaj danĝeroj pro gentekniko, tion nuntempe neniu povas diri definitive. Ne ekzistas pruvoj pri danĝeroj – sed ankaŭ inverse: ne ekzistas pruvoj, ke jen ne estas danĝeroj. Kaj tio estas forta argumento: dum oni ne povas esti certa pri maldanĝero, estus pli ol stulte akceli eventuale riskan teknologion. Certe, enestas ankaŭ ideologio ĉe rezistuloj kaj mediprotektantoj, tamen ankaŭ la proparolantoj krom sian kredon ne povas multe prezenti. Kiajn belajn promesojn donis al ni la genteknologia industrio: dezertoj ekfloros, malsato malaperos, malsanoj ekstermiĝos. Sed kie estas tiuj miraklaj kreskaĵoj, kiuj solvos ĉiujn problemojn de la mondo? Kie estas la miraklaj medikamentoj faritaj helpe de gentekniko? Ili mankas kaj evidente ne aperos tiel rapide. De jarcentoj oni esploras kaj eksperimentas, sed ĝis nun vane. Escepte de *Mon810* mankas sukcesoj, kaj ankaŭ ĝi do estas tre pridubinda, ĉar probable riska.

Do ni ne miru, ke konsciaj konsumantoj (en Eŭropo) je granda plimulto fajfas je genteknologio, ja forte rifuzas ĝin, ĉar ili timas pri neregeblaj danĝeroj. La genteknika industrio prezentu verajn sukcesojn; tiam certe ankaŭ kultivistoj kaj konsumantoj akceptos la rezultojn. Sed ŝajnas, ke grand-skale genteknologio ne kapablos plenumi la grandiozajn promesojn. Dume ni manĝu normalajn legomojn – kaj restos sanaj. ■

Naskiĝas du pliaj NATO-membroj

Ekde frua aprilo 2009 Albanio kaj Kroatio membras oficiale en Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO). Finfine eblis membriĝo post interna reformado de la ekonomia kaj jura sistemoj de la du ŝtatoj, same plifortigo de sekureco, libereco kaj aliaj aspektoj de la socia vivo.

Albanoj estas sufiĉe entuziasmaj pro membriĝo. Tion spegulas lastatempa enketo, kiu indikas, ke 98 % de la albanoj subtenas membriĝon. Tiel ili atendas pli da fremdaj investaĵoj, kiuj probable altiĝos pro enlanda sekureco. Cetere membriĝo en NATO signifas alpaŝon al membriĝo en la Eŭropa Unio (EU). Fine, NATO-membriĝo firmigas landlimojn kaj ties agnoskon fare de najbaraj ŝtatoj, ekzemple Grekio.

Ne hazarde, antaŭ la NATO-membriĝo de Albanio, Grekio subskri-

bis traktaton pri suda marlimo, malgraŭ protestoj de naciismaj organizaĵoj en Grekio, kiuj delonge volas teritorion en Norda Epiro aŭ suda Albanio.

Blokinta

Bonŝance, Kroatio jam solvis problemojn kun Slovenio, kiu portempe estis blokinta ties membriĝon kaj kiu same atendas baldaŭan membriĝon ankaŭ en EU.

Aliflanke Makedonio ankoraŭ stagnas pro blokiĝo de najbara Grekio, kiu postulas ŝanĝon de la nomo de tiu ĉi ŝtato. Albanaj partioj en Makedonio volas, ke ĝi nomiĝu Norda Makedonio, kio kontentigus grekojn. Poste oni esplorus sciencmaniere la etnogenezajn radikojn de la popolo de Makedonio. Se deks-trulaj regantoj slavmakedonaj ne tiom

longe obstinus, Makedonio estus jam la 29a NATO-membro.

Oni atendas, ke baldaŭ membriĝos al NATO ankaŭ du aliaj okcident-balkanaj landoj: Bosnio-Hercegovino kaj Montenegro. Tiucelan iniciaton jam entreprenis Albanio kaj Kroatio kunlabore kun Usono. Antaŭ nelonge estis subskribita interkonsento pri libera serviza komunikado inter Albanio kaj Bosnio-Hercegovino.

Bardhyl SELIMI

Membro-Ŝtatoj de NATO

Ŝtatoj ĉisube sen kroma aliĝo-jaro estas membroj ekde la fondo en 1949.

Albanio (2009)
Belgio
Britio
Bulgario (2004)
Ĉeĥio (1999)
Danio
Estonio (2004)
Francio
Germanio (1955)
Grekio (1952)
Hispanio (1982)
Hungario (1999)
Islando
Italio
Kanado
Kroatio (2009)
Litovio (2004)
Luksemburgo
Nederlando
Norvegio
Pollando (1999)
Portugalio
Rumanio (2004)
Slovakio (2004)
Slovenio (2004)
Turkio (1952)
Unuiĝinta Reĝlando
Usono



ALBANIO

Nova leĝo pri malnova reĝimo



En la albana parlamento tiuj, kiuj suferis sub la komunisma diktaturo, bonvenigis la novan leĝon.

Komence de 2009 aprobis la albana parlamento leĝon, kiu malfermas dosierojn el la komunista periodo inter 1944 kaj 1990. La t.n. lustracio-leĝo¹ antaŭvidas la elpostenigon de funkciuloj, inkluzive de policianoj kaj parlamentanoj, kiuj dum tiu ĉi periodo iel kunlaboris kun la sekreta polico.

La leĝo estis proponita jam en 1995, sed forte kontraŭis ĝin maldekstruloj kaj pluraj internaciaj instancoj. En 1997 la tiama socialista registaro kreis komisionon pri la „pureco de politikaj figuroj”, por ke ne plu eniru la parlamenton aŭ ŝtatan administracion eksaj aktivuloj en la komunisma reĝimo. Malgraŭ tio, tamen, restas en gravaj pozicioj prokuratoroj, juĝistoj kaj aliaj altranguloj el la antaŭa epoko.

Balotoj

Ekzemple, kvaropo tia konsistigas la konstitucian tribunalon, dum aliaj prezidas politikajn partiojn kaj estras privatajn televido-kompaniojn. Tial, dum la balotoj en 2005, demokratoj promesis

per la lustracio-leĝo malpermesi al eksaj komunismaj krimuloj enposteniĝi en altaj ŝtataj institucioj, inkluzive de la parlamento.

Ĝis ĉi-januale maldekstraj partioj sukcese blokis la proponon. Ili argumentis, subtenataj ekzemple de la ĉeĥa registaro kaj la ambasadoj de Usono, Britio kaj Danio, ke la registaro povus misuzi la leĝon por elsarki siajn politikajn malamikojn. Kontraste tiuj, kiuj suferis sub la komunisma diktaturo, bonvenigis la novan leĝon.

Bardhyl SELIMI/pg

1. En la periodo post la falo de la diversaj eŭropaj komunismaj ŝtatoj inter 1989 kaj 1991, la termino estis uzata en la politiko, kiu limigis la partoprenon de siatempaj komunistoj, kaj precipe de informintoj de la komunista sekreta polico, en la postaj registaroj aŭ eĉ en civilaj postenoj. En la moderna epoko „lustracio” do pruntis la signifon „intensive purigi” de la latina historia sento kaj aplikis ĝin al la proceduro en kiu ŝtato traktis siajn iamajn rompojn de homaj rajtoj aŭ okazintajn maljustaĵojn.

UKRAINIO

Libero eble ne tro liberala

En Ukrainio la populareco de la prezidanto, Viktor Juŝenko, preskaŭ nulas. Krome neniu scias, kiun politikan partion subteni. Ĉiuj partioj multon promesas, sed nenion faras. Tion montras balotoj por la parlamento en la Teropil-provinco. Venkis la partio „Libero” estrata de Oleg Tjagnijenko. Ĝi gajnis 33,8 % de la voĉoj, kompare kun nur 5,5 % por la prezidanta partio „Nia Ukrainio”.

La partio „Jediniĵ centr” gajnis 13,8 % de la voĉoj; la Partio de Regionoj 9,7 %; kaj BJUT 8 %. Jen la dua malvenko por BJUT (okazis la unua en 2008 en Kievo). La partion „Libero” oni taksas naciisma. Multaj opinias, ke ĝia venko povus malstabiligi kaj eĉ dispecigi la landon.

Dmitrij CIBULEVSKI



Oleg Tjagnijenko: lia partio „Libero” eble malstabiligos.

Obamenaĵo, aŭ haladzo de socialisma aventurismo

Tiel historiistoj de la estonteco verŝajne nomos la nunan tragikan epokon de usona historio. Verdire, ekzistis antaŭaj registaroj, kiuj ekis socialisman aventurisman. Clinton kaj Bush (la filo), sekvante utopiajn ideojn, devigis bankojn rompi la regulojn kaj financi hipotekon de tiuj, kiuj nek kapablis nek planis redoni la ŝuldojn.

Tamen en ĉi tiu artikolo temas nek pri la socialismo infektinta Usonon, nek pri la ekonomia katastrofo kaŭzita de la aventurismo de socialismaj elitoj. Temas pri subfoso de la lando-fundamento rezulte de neglektemo flanke de la tri branĉoj de la ŝtatregado kaj de la du ĉefpartioj (praktike jam kvazaŭ unu). Rezulte, en la prezidanta fotelo de Usono nun sidas ... uzurpulo.

„Ha, jen denove konspira teorio,” ekpensos eble leganto, al kiu la amas-komunikilaro instruis, ke ĉiu ajn, kiu pridubas la leĝecon de Obama, estas obsedita herezulo (angle *birther*, kiu dubas pri la valideco de la nasko-atestilo de Obama).

Ne. Uzataj estas neniuj kaŝitaj aŭ sekretaj nekontroleblaj faktoj. Nur ĝenerale konataj aŭ facile kontroleblaj faktoj estas ĉi tie prezentataj¹.

Konstitucio

Laŭ la konstitucio de Usono, artikolo II, sekcio 1 (4), „neniu krom hereda civitano (angle: *natural born Citizen*), aŭ civitano de Usono, dum aprobo de tiu ĉi konstitucio, rajtas okupi la postenon de la prezidanto.”

Atentu: la patroj-fondintoj certe distingis inter la nocio „civitano” kaj „hereda civitano”, komprenante, ke ili mem ja ne povas esti heredaj civitanoj



PRESIDENTIAL INAUGURAL COMMITTEE

Tamen kio pri la valideco de Obama?

Laŭ la oficiala biografio, la biologia patro de Obama estis civitano de Kenjo (aŭ Britio), do Obama ne estas hereda civitano de Usono.

Nur pro tio li ne rajtas nek servi kiel prezidanto de Usono nek kampanji kiel kandidato.

de dume ne ekzistanta lando. Tial ili rezervis la kondiĉon de simpla civitaneco – sed nur por siaj samtempuloj.

La nocio „hereda civitaneco” (angle: *natural born*) restis ne difinita en la konstitucio kiel memevidenta dum la epoko

de la patroj-fondintoj, kaj kiu sekvis el la „natura leĝo”. Ĝi restis formale nedifinita ankaŭ en pli postaj leĝaroj de Usono. Tamen neniam iu „hezitis” pri ĝia vera senco. Por esti hereda civitano de Usono la dosiero de individuo devas kontentigi duoblan kriterion (Emerich de Vattel, *The Law of Nations* (La leĝo pri ŝtatoj) (1758), ĉapitro 19, § 212): ambaŭ gepatroj devas esti civitanoj de Usono kaj la nasko devas okazi sur jura teritorio de Usono.

Jurkazoj

Oni pliprecizigas la sencon de usonaj leĝoj pro precedencoj de ĝia apliko en la pasinteco. Tiaj precedencoj ekzistis, ekzemple en la jurkazoj Usono kontraŭ Wong Kim Ark, 169 U.S. 649 (1898), aŭ Minor kontraŭ Happersett, 88 U.S. 162 (1874). Tamen la plej lasta kazo, kiam oni aplikis la nocion „*natural born*”, okazis en 2008. Tiam la usona senato diskutis la validecon de la prezidanta kandidato McCain. (Senata rezolucio 511, prezentita de senatano Leahy en aprilo 2008, akceptita unuanime).

Ĝuste laŭ la duobla kriterio la senato konkludis, ke, jes, McCain estas hereda civitano. La decido estas streĉita. Ambaŭ gepatroj de McCain ja estis civitanoj de Usono (kaj tre honoraj), sed li naskiĝis en hospitalo en Panamo kaj teorie povus fariĝi civitano de Panamo.

Tamen kio pri la valideco de Obama? Kiel okazis, ke en nenies kapon venis ideo apliki la samajn kriteriojn ankaŭ al Obama? Laŭ la oficiala biografio, la biologa patro de Obama estis civitano de Kenjo (aŭ Britio). Sendepende de tio sur kies teritorio li naskiĝis (kaj kio troviĝas en lia vera nasko-atestilo), li ne estas hereda civitano de Usono. Nur pro tio li rajtas nek servi kiel prezidanto de Usono nek kampanji kiel kandidato.

Politikistoj

Vi neniam legis aŭ aŭdis tion, ĉar malhonestaj politikistoj kaj amaskomunikiloj ne permesas eĉ aludi al la evidenta fakto, ke li ne estas hereda civitano. Por tuj kompromiti kaj konfuzi iun ajn oponanton, ili anstataŭigas la „heredan

civitanecon” per malpli profunda kategorio de „civitanecon rezulte de nasko”, kio neniel rilatas al la konstitucia postulo.

Malkiel la nocio „hereda civitaneco” devenanta el historia pasinteco, la „civitanecon rezulte de nasko” estas difinita en la moderna usona leĝaro. Ekzemple, laŭ punkto § 1401(a), infano naskita sur teritorio de Usono iĝas civitano de Usono. Tiel akiras civitanecan la tiel nomataj „ankraj beboj” (angle: *anchor babies*)

Unue en la historio de Usono okazis gravega neglekto de la konstitucio.

... en la Blanka Domo enloĝiĝis uzurpulo, kiu ne estas hereda civitano de Usono.

Eble li eĉ ne estas civitano de Usono.

naskitaj de kontraŭleĝaj loĝantinoj aŭ turistinoj.

Aliaj punktoj de § 1401 traktas situaciojn, kiam gepatroj-usonanoj naskas bebon eksterlande, aŭ kiam nur unu el ili estas usonano. Aparte punkto § 1401(g)(aŭ § 301(a)(7) de akto de 1952 dum la tempo de la naskiĝo de Obama) rilatas al situacio, kiam nur unu el la gepatroj estas usonano kaj la naskiĝo okazis eksterlande. La leĝo postulas ĉi-okaze, ke en la momento de la akuŝo la patr(in)o-civitano jam havu ne malpli ol kvin-jaran usonan civitanecan, kalkulantante ekde 14 jaroj, alivorte, ke li/ŝi estu ne malpli ol 19.

Avino

La avino de Obama (laŭ la patro) Sarah Obama atestis: „Mi ĉeestis dum lia naskiĝo en hospitalo de Mombasa, Kenjo, la 4an de aŭgusto 1961” (la originalo de la registraĵo de la intervjuo troviĝas ĉe Philip Berg, pri kiu temos sube). La patrino de Obama (usonano) estis tiam 18, do ŝi ne povis usonanigi la bebon en eksterlanda teritorio. Tial la propagando

penas kredigi, kvazaŭ Obama naskiĝus en la usona ŝtato Havajo (kio krome ne farus lin hereda civitano).

Tamen la fakto de lia naskiĝo en Havajo ne estas jure pruvita. Ĉiuj penoj pruvi tion baziĝas je falsita dokumento metita en la retejon. Laŭ ĝia formo kaj enhavo ĉi tiu dokumento ne estas la plena atesto pri la naskiĝo (angle: *complete birth certificate*), sed la mallongiĝinta versio (angle: *certification of live birth*). Tiutempe Havajo eldonis tian dokumenton laŭpete por iu ajn (sendepende de la civitaneco). Ĝi ne enhavas la fundamentan informon pri la gepatroj, pri la hospitalo, pri la kuracisto akceptinta la akuŝon ktp. Eĉ tiu ĉi mallonga atestilo estas falsita, ĉar ĝia formo, fono kaj kadro malsamas de similaj aŭtentikaj dokumentaj tiutempaj.

Atentu, ke malkiel ĉiuj aliaj kandidatoj je altaj ŝtataj postenoj, Obama jure blokis aliron al ĉiuj siaj dosieroj, ekde hospitaloj de Havajo ĝis la universitato de Harvard, kie li studis. Tio estas senprecedenca ne nur pro la fakto mem de la blokado, sed ankaŭ, ke neniu ajn petis liajn dokumentojn por kontroli – kaj temas ja pri la plej supera posteno en la lando. Nur en 2009 kongresano Bill Posey prezentis leĝproponon, ke la federala elektokomisiono tamen kontrolu la naskiĝatestilojn kaj aliajn dokumentojn de la kandidatoj.

Duon-filo

Kaj jen eĉ pli. La dua (duon-)patro de Obama, Lolo Soetoro, estis civitano de Indonezio. Li adoptis la junulon kaj venigis lin en Indonezion, kie li registris la duon-filon kiel Barry Soetoro, civitano de Indonezio, islamanon. Indonezio ne rekonis duoblan civitanecan, do se Obama havis iun usonan civitanecan antaŭe, ĝi estis nuligita. Poste Obama veturis el Indonezio eksterlanden, inkluzive de Pakistano, kien eniro por usonanoj tiutempe estis malpermesata. Do la fakto pri lia indonezia civitaneco estas evidenta.

Poste, reveninte en Usonon, li povus re-civitaniĝi, sed nur kiel adoptita civitano (angle: *naturalized citizen*):

neniel kiel heredita. En universitato de Harvard li povus lerni (kaj eĉ ricevi stipendion) kiel eksterlandano (kio facile evidentiĝus, se lia dosiero ne estus fermata).

Do, unue en la historio de Usono okazis gravega neglekto de la konstitucio. Sekve en la Blanka Domo enloĝiĝis uzurpulo, kiu ne estas hereda civitano de Usono. Eble li estas nenia civitano de Usono, reteninte sian indonezian civitanekon.

„Tio ne eblas, ĉar tio neniam ajn eblis”, eble opinias la leganto, kiu unuafoje alfrontas ĉi tiun groteskan situacion. „Kial do ĉiuj silentis dum la prezidanta kampanjo en 2008?”

Preteksto

Ne ĉiuj silentis. Ekza vicprokuristo de la ŝtato Pensilvanio (demokrato) Philip Berg ekprocesis kontraŭ Obama en Filadelfio, plendante, ke tiu ne estas eĉ civitano de Usono. La juĝisto akceptis la kazon kaj eldonis oficialan postulon (angle: *subpoena*) por vidi la aŭtentikajn dokumentojn de Obama. Post la necesa unumonata periodo nenijaj dokumentoj alvenis al la juĝisto. En normala situacio tio aŭtomate signifus, ke la plendanto Philip Berg venkis. Tamen je ĝuste tiu ĉi malfrua stadio la juĝisto ial rezignis plukonsideri la kazon, laŭ la ridinda preteksto, ke la plendanto spertis nek perdojn nek personajn ĝenojn. Alivorte, ke la kazo senkialas (angle: *no standing*). Ekmemoru ĉi tiun formulon.

Ekde somero 2008 kelkdeko da civitanoj ekprocesis, deklarante, ke Obama ne estas hereda civitano aŭ eble neniu civitano de Usono. Inter la plendantoj estis ankaŭ mem prezidanta kandidato, ambasadoro Alan Keyes. Notu, ke Keyes estas nigrulo. Ĉiuj juĝistoj cinike sabotadis kaj rifuzis konsideri la kazojn sub la sama preteksto, kvazaŭ ordinarnaj usonaj civitanoj ne estus ĝenitaj per duboj pri la valideco de sia prezidanto.

Voĉdonado

Philip Berg kaj la aliaj advokatoj re-prezentis siajn kazojn al la Supera Kortumo de Usono antaŭ ĉiu el la sek-



EL SOL

**La 20an de januaro
la ĉefjuĝisto
de la Supera Kortumo
akceptis
la prezidantan ĵuron de ...
la uzurpulo!
Supozeble de eksterlandano,
kies dokumentojn
neniu vidis.**

vaj gravaj stadioj: antaŭ la voĉdonado de la 4a de novembro 2008; antaŭ ol la ŝtatoj konfirmis la voĉdonan kolegi-on; kaj antaŭ la kunveno por akcepti la voĉdonan kolegiaron. Ĉiufoje la Supera Kortumo rezignis konsideri la kazojn: kial? Jes, vi divenis ĝuste: senkiala aŭ „*no standing*”. Aŭ tradukita per lingvo pli propra al tiel nomata banana respubliko: „Vin, hundon, tio ne koncernas!”

La 20an de januaro la ĉefjuĝisto de la Supera Kortumo kun senhezita mieno akceptis la prezidantan ĵuron de ... la uzurpulo! Supozeble de eksterlandano, kies dokumentojn neniu vidis.

Krizo

Krom kelkaj malgrandaj agentejoj, nenijaj ĉefaj amaskomunikiloj iam tuŝas

ĉi tiujn groteskajn – sed memevidentajn – faktojn. Plej sistemece kaj regule raportas pri ĉi tiu konstitucia krizo la agentejo *World Net Daily* de Joseph Farah (www.wnd.com). Estis li, kiu kolektis pli ol 330 000 subskribojn, kaj transsendis al la Supera Kortumo dekmilojn da leteroj, postulantaj tuj kontroli la paperojn de Obama kaj interrompi lian oficon.

Restas do multaj demandoj:

Kial dum Obama-kampanjo ne protestis prezidanto Bush, kies devo estas protekti la konstitucion?

Kial ne protestis kaj ne protestas eĉ unu el pli ol 500 kongresanoj, kies devo estas ankaŭ protekti la konstitucion?

Kial ne protestis kaj ne protestas la Supera Kortumo, kies devo estas kio? Ĝuste, protekti la konstitucion.

Kial ne protestis kaj ne protestas la respublikana partio kontraŭ neleĝa rivalo? Rivalo!

Kial la demokratia partio subtenis neleĝan kandidaton?

Kial ne protestis moŝta sinjorino Clinton, kiun oni tiel senceremonie forpuŝis meze de ŝia propra prezidanta kampanjo?

Kial ne protestis kaj ne protestas eĉ unu el la 50 tiel nomataj ŝtat-sekretarioj, kiuj kontrolu la validecon de la kandidatoj? Aparte, kial la sekretariino de Kalifornio ne subtenis la proteston de la prezidanta kandidato Alan Keyes? Tio estas tre malbona, sinjorino sekretariino, ofendi 100 % nigrulan kandidaton de „proleta origino”. Tio ĉi nomiĝas „rasismo”, oni sciu. Oni severe riproĉos vin pro tio ...

Kaj tiel plu. Demandoj multas. Tamen la respondojn mi ne havas. Intertempe eventoj ĉiutage evoluas. Ĉiuj, por kiuj la estonteco de Usono gravas, jam rekonis la amplekson de la konstitucia krizo. Patriotoj komprenas, kio okazas, kaj senĉese sciigas pri tio perfidemajn oficistojn, kies aroganteco simple spitas inteligentecon.

Alexander GOFEN

1. Ndlr: krom, ekzemple, rilate diversajn atestilojn sube menciitajn, kiuj pro ajnaj kialoj ne kontroleblas.

Parolas enketo, sed ne fremdlingve

En marto la ĵurnalo *Mainiĉi* publikigis enketon pri la planoj de 100 ĉefaj kompanioj por dungi novajn universitato-finintojn. Laŭ la enketo, la kompanioj alte taksas jenajn punktojn ĉe la kandidatoj:

Nombro de kompanioj	Ecoj
80	Kapablo pri komunikado
64	Aktiveco
34	Fervoro por la kompanio/laboro
32	Bona karaktero
27	Respondeco
26	Harmonio kun aliaj homoj
10	Adaptiĝo-kapablo
2	Pacienco
2	Scio pri la fako
2	Sperto pri klubaj aktivoj / volontula agado
0	Lingvo-kapablo

Surprizas du aferoj. Unue, la kompanioj ne alte taksas sciencajn atingojn. Junuloj pasigas kvar jarojn aŭ pli en universitato, tamen la kompanioj ne volas konsideri ĉi tiujn jarojn. Ŝajnas, ke la kompanioj volas homojn, kiuj obeeme aŭskultas kaj obeas ordonojn, kaj kiuj energie, sindone kaj ĝismorte dediĉos sin al la laboro.

Due, la firmaoj ignoras lingvo-kapablon. La ministrejo pri edukado kaj scienco (kaj la registaro) ĉiam diras, ke japanoj havas malaltan kapablon uzi eksterlandajn lingvojn (ĉefe la anglan) kaj planas enkonduki anglajn lecionojn en elementajn lernejojn. Tamen laŭ la enketo neniu kompanioj interesiĝas pri lingvoj.

Ministrejo

Kia diferenco inter la ministrejo kaj la kompanioj. La unua trudas al la popolo la anglan, sed la lastaj neglektas ĉi tiun kapablon. Kial la ministrejo insistas pri la angla? Por ke Usono povu profiti, vendante anglajn librojn kaj sendante instruistojn al Japanio? Por igi Japanion la 51a usona ŝtato? Kial la kompanioj ne taksas lingvo-kapablon? Ĉu ili ne plu volas agadi internacie? Ĉu jam sufiĉas tradukistoj kaj interpretistoj?

Por ellerni la anglan, multaj lernantoj enverŝas grandegan energion, elspezas grandan monsumon kaj eluzas sian cerbon, ofte perdante esperon kaj memfidon pri sia kapablo. Multaj studentoj, kredante, ke la kvalifiko pri la angla donos bonan ŝancon pri sia dungiĝo ĉe bona kompanio, vizitas lernejojn de la angla post sia studo en universitato.

Leviĝas diversaj demandoj ankoraŭ sen taŭgaj respondoj. Tamen certas, ke la angla ne garantias laboron en la 100 ĉefaj kompanioj. Tio signifas, ke lerni la anglan kaj tial elspezi energion kaj monon, senutilas.

HORI JASUO

Pununtoj politike punitaj

Samseksemo ne estos punita en Burundo post decido en februaro de la senato. Samtempe la senatanoj abolis la mortopunon.

La tiel nomata Integrita Oficejo de Unuiĝintaj Nacioj en Burundo bonvenigis la decidon, kiu nuligas proponon aprobitan en novembro en la landa asembleo por puni samseksajn rilatojn. En letero la internacia organizaĵo alvokis al la senato respekti homajn rajtojn kaj malakcepti la asemblean proponon.

El 43 ĉeestantaj senatanoj, 36 voĉdonis kontraŭ la propono subtenata i.a. de la ministro pri justico, kiu publike diris, ke samseksemuloj meritas mortopunon.

Rilatoj tabuaj

Burundanoj havas diversajn opiniojn pri samseksemo. Kelkaj diras, ke oni punu tiajn rilatojn, kiuj estas tabuaj en Burundo; aliaj, ke ili ne komprenas, kial puni homojn, kiuj interkonsentas pri sia seksa konduto. Ili argumentas: „La registaro ne interveni en agoj, kiuj ne ĝenas aliajn homojn. Se jes, ĝi povus malpermesi seksajn rilatojn inter homoj de malsamaj seksoj.”

Notindas, ke reprezentantoj de diversaj religioj skribis al la prezidanto, mem religiema, kaj petis, ke samseksemuloj estu punitaj. Samseksemo, ili diras, povus vekti la koleron de Dio. Cetere ankoraŭ ne estas agnoskita samseksemula asocio en Burundo.

La decido de la senato estos resendita al la deputitaro en la asembleo. Se la asembleanoj ne akceptos la verdikton de la senato, la du ŝtatorganoj starigos komisionon por interkonsenti pri leĝaro fine aprobita de la prezidanto.

Jérémie SABIYUMVA

La blua miraklo

„Mazingira” estas vorto en la svahila lingvo kun signifo: naturo, medio, naturprotekto. En norda Tanzanio, distrikto Bunda, inter lago Victoria kaj naturrezervejo Serengeti, estas aro da kvin vilaĝoj nomata „Salama” (paco).

Homoj tie vivas en malriĉo. Virinoj havigas akvon el flakoj kilometrojn forraj. Plurcent orfoj estas sen vivrimedoj. Ne disponeblas kurento. La vilaĝestro, Mramba Simba, parolas Esperanton, kaj klopodas uzi siajn kontaktojn kun Eŭropo por plibonigi la vivkondiĉojn de la 14 500 vilaĝanoj.

Mankas akvoputoj, lernejoj, mono por edukado kaj instruado de orfoj. En 2008 Mramba Simba vizitis Eŭropon kaj varbis por subteno de la regiona projekto „Mazingira”, kiu organizas konstruadon de akvoputoj kaj lernejoj, kolektas monon por mikrokreditoj kaj subtenas orfojn.

Sensalajre

En sud-germana urbo Aŭgsburgo oni tiucele kolektis kelkmilojn da eŭroj per diversaj agadoj. Ayten Köksal, mastrino de frizejo SchnippSchnapp [ŝnipŝnap] – onomatopea vorto por la ago de tondilo – dum du tagoj laboris sensalajre, tondis harojn de klientoj kaj eminentuloj, kiel ekzemple la federacia parlamentano Heinz Paula kaj la ĉefurbestro Kurt Gribl. Tiel ŝi enspezis 1000 eŭrojn kaj donacis la tutan sumon.

La akvocentralo, funkcia kiel historia muzeo, kolektis monerojn kaj monbiletojn. Per la donacita mono la vilaĝestraro de Salama aĉetis interalie ekipaĵon por putoborado. Unu puto antaŭe kostis pli ol 6000 eŭrojn. Nun borante mem, oni ŝparas monon kaj bezonas nur iom malpli ol 800 eŭrojn por tuboj kaj pumpilo por unu puto. Grupo de subtenantoj daŭrigas aktivaĵojn por



kolekti monon kaj tiel subteni la akvo-projekton en Salama.

Parolturno

Alude al germana parolturno *ein blaues Wunder erleben* (laŭvorte: sperti bluan miraklon), sperti malagrablan surprizon, la teatroensemblo *Berliner Compagnie* verkis teatraĵon titolitan *Das blaue Wunder* (La blua miraklo). Temas pri tutmonda tendenco al privateco de ŝtataj kaj komunumaj entreprenoj, precipe akvo-provizaj. Kiu kredas, ke privataj entreprenoj laboras pli bone ol publikaj, tiu baldaŭ spertos „bluan miraklon”.

Malboniĝas kvalito, kreskas prezoj. Investintoj gajnas grandegajn profitojn.



Harojn tondi en Germanio signifas putojn fondi en Tanzanio.



Germana ensemblo atentigas pri la neceso provizi akvon ne privatigitan.



Mankas akvoputoj, lernejoj, mono por edukado kaj instruado de orfoj...

En Cochabamba, Bolivio, la popolo komence suferegis, poste organizis kolektivitan proteston. Tiu movado sukcesis. La vendo de akvoprovizado estis nuligita. Ne ĉie la loĝantaro sukcesas tiel solidarece organizi „akvomiliton”. La financpova alianco de firmaoj kaj politiko multloke energie klopodas antaŭenpuŝi privatigon.

Akvo-krimuloj

En la teatraĵo la akvo-krimuloj renkontiĝas en – intertempe privata – kanalreto sub Parizo, alian fojon en

psikiatria kliniko en Berlino, en hotelo Kor’ de Jesuo pinte de la Kristo-statuo super Cochabamba, en dezerto kaj en korto de malliberejo. Tie je la fino la entreprenestroj mem spertas la „bluan miraklon”. La civila rezisto do venkas.

La direktoro de la akvocentralo en Aŭgsburgo invitis la ensemblon, kaj la urba entrepreno pagis la kostojn. Ducent gastoj vizitis la spektaklon. La enspezoj de 2000 eŭroj, akiritaj pro vendo de enirbiletoj, estas donacitaj por akvoputoj en tanzania Salama.

Jomo IPFELKOFER

UKRAINIO

Ovacioj, aŭ ĉu nur ovoj?



Ne ĉiu aprobis la inaŭguron de la monumento dediĉita al Mazepa.

Ripetiĝas la demando en Ukrainio: „Kiu estis Mazepa?” Ĉu li estis vera batalanto kontraŭ rusoj, aŭ ĉu li „transiris” al la svedoj dum la milito inter Rusio kaj Svedio antaŭ 300 jaroj?

Okaze de la 370a datreveno de la naskiĝo de la ukraina hetmano la prezidanto de Ukrainio inaŭguris monumenton dediĉitan al Mazepa. La ceremonio okazis en la ĉefurbo sur placo, kie siatempe danke al mono de Mazepa estis konstruita la militkatedralo de Sankta Nikolao.

Aliflanke de la placo staris kontraŭuloj de la evento. Cetere en Simferopolo (Krimeo) okazis pli vasta manifestacio „kontraŭ la perfidulo de la rusa popolo”. Portreton de Mazepa oni priĵetis per ovoj.

Dmitrij CIBULEVSKIJ

Katastrofa reĝinotago



La reĝa familio amase kunfestas la oficialan naskiĝdaton de reĝino Beatrix.

Reĝinotago en Nederlando kutime estas granda tutlanda festo. Ne nur subtenantoj de la Oranĝo-dinastio, sed ankaŭ la plimultaj respublikemuloj, ja efektive pli-malpli la tuta loĝantaro de la lando tiudate estas en festa etoso.

Ĉie sur la stratoj oni dismetas la proprajn vendotapiŝojn por siaj varoj (ofte infanoj tiel akiras siajn plej fruajn komercistajn spertojn pri hejmkolektitaj brokantaĵoj – en Hago eĉ tutnokte la tagon antaŭe oni jam komencas la festadon); ĉie estas ludaj prezentadoj same amatoraj kaj profesiaj; ĉie oni ekzercas sin pri tradiciaj ludoj, metioj, preparado kaj konsumado de malnovstilaj kaj modernaj nutraĵoj kaj trinkaĵoj, muzikado, kariljonado ktp.

Naskiĝdato

La tuta lando, tiun 30an de aprilo, kutime estas unu granda festa familio. Ankaŭ la reĝa familio, kun princoj, princinoj kaj geprincidoj, amase kunfestas la oficialan naskiĝdaton de reĝino Beatrix. Fakte ŝi datrevenas en alia sezono sed, por konveneco al la popolo, ŝi konservas la daton de la antaŭa reĝino, Juliana. Cetere fariĝis tradicio, ke por tiu reĝinotago ŝi elektas ĉiujare novan regionon aŭ urbon, kie la tiea loĝantaro abunde povos festi la nacian tagon kune kun la reĝa familio.

Ĉi-jare, ĉar ekzakte antaŭ 100 jaroj naskiĝis reĝino Juliana (1909-2004), Beatrix volis festi la tagon en Apeldoorn, apud kaj ĉirkaŭ la reĝa palaco *Het Loo*. Tie ĉiuj vilaĝoj de Apeldoorn preparis prezentadojn pri siaj specialaĵoj por la posttagmeza programo. Matene la princoj kaj princinoj partoprenis kun la publiko en amuzaj distraĵoj. Pluraj homoj igis sin foti kun princo aŭ princino

kaj oni amuze interbabilas: estas vera festo. Tute senstreĉa etoso, kiel ĉiam.

Defilo

Post eble du horoj la reĝa familio kolektiĝis en duetaĝa buso kun malferma tegmento; malrapide ili veturis tra la vicstaranta publiko al la palaco, kie poste devos okazi grandioza defilo. Malsimile je pluraj aliaj landoj, tia defilo kutime estas simpla popolfesto, certe ne militista afero, kvankam ankaŭ grupoj da soldatoj povas partopreni. Defilas tie ekzemple grupoj en lokaj naci-kostumoj el diversaj vilaĝoj. Dum pluraj jaroj tia defilo ne plu estis centra en la festado, sed ĉi-jare pro la 100-jara datreveno de reĝino Juliana oni ja planis ĝin denove.

Meze inter parado de malnovtipaj ĉaroj kaj aŭtoj kun homoj en historiaj vestaĵoj de antaŭ jarcento, subite jen tra la baraĵoj, trans kaj tra la publikon ekpafiĝis nigra aŭtomobilo. Ĝia antaŭa parto estis jam forte difektita, kiam ĝi fariĝis televide videbla, kuntrenante multajn virinojn, virojn kaj infanojn. Fine ĝi kolizie ekhaltis kontraŭ memor-

kolono pri reĝino Wilhelmina meze de placeto, laŭ kiu ĝuste tiumomente pasis la buso kun la reĝa familio. Policisto surbicikla ĝuste lastsekunde flankeniĝante sin kapablis savi de la aŭtomobilo. Ĉion registris la televido.

Fajrobrigado

Ne estiĝis kriado aŭ ĥaoso, sed ege sinregegan policistoj, brankardistoj, flegistoj k.s. alkuris de ĉiuj flankoj kaj komencis prizorgi la vunditojn, dum la nigran aŭton ĉirkaŭis policistoj. Alveninta skipo de la fajrobrigado devis elsegi la vunditan ŝoforon el la vrako. La buso kun la reĝa familio, ĉiuj ege ŝokitaj, tuj pluveturis al la palaco fine de la aleo.

Mortis minimume ses homoj pro la aŭtomobila akcidento. La 38-jara farinto tuj post la okazaĵo diris al la polico, ke li vere celis la reĝan familion. Estis lia intenco minimume vundi ilin. Duontagon poste ankaŭ li mortis en la malsanulejo. Supozeble pro la difektiĝo de la veturilo ĉe la traveturado tra la baraĵojn, li ne plu povis bone teni la stirilon, kien li celis. Li nur kelkajn metrojn mistrakis la bu-

son. Ankoraŭ estas multaj vunditoj en malsanulejoj de la ĉirkaŭo.

Tragedio

Entute la reĝinotago, kiu tiel feste komenciĝis, finiĝis kun sento pri tragedio. En multaj urboj la lokaj aŭtoritatoj nuligis la festaĵojn kaj lokaj Oranĝo-organizaĵoj ĉesigis la feston. Kelkloke tamen oni en malpli granda formo plu festis. Ja preskaŭ duonjaron oni antaŭplanis la procesiojn kun bele ornamitaj ĉaroj k.s.

Restas la demando: kia estos la festo estonte? Kelkaj komentistoj jam diris, ke la ĝisnuna libera festado de reĝinotago ne plu eblos. Princoj kaj princinoj estonte devos esti ege ŝirmataj de korpogardistoj. Ili ne plu senĝene miksiĝu kun la publiko, kiel ĝis nun. Aliaj diras, ke kontraŭ frenezuloj ne ekzistas ŝirmado: se aŭton oni ekuzas kvazaŭ raketon, neniu povas reteni tion.

La kulpulo, kies kialoj verŝajne neniam estos konataj, trafis la landon en la koron.

Gerrit BERVING



Mortis minimume ses homoj

ŜOFORADO

Aŭtistoj „armitaj”



Jurnalisto en Beogrado, Serbio, lastatempe komentis: „Multaj serbaj ŝoforoj ne veturas. Ili estas armitaj per siaj aŭtomobiloj”.

Tio sonas vere, ĉar en Beogrado dum la unua semajno de aprilo pereis pro trafik-akcidentoj ok homoj. Necesas novaj, pli rigoraj leĝoj, sed tiuj ankoraŭ ne pretas.

Dimitrije JANIĆ

ALBANIO/ĈINIO

Muro-plezuro

Lastatempe, okaze de ŝtatestra kunveno en Ĉinio por pridiskuti mondajn ekonomiajn problemojn, la albana ĉefministro Sali Berisha vizitis la Grandan Muron. La albano, konata en sia lando kiel fervora migranto, grimpis 1500 ŝtupojn por atingi la plej altan parton de la muro. Tion ĝis nun faris neniu

el la 400 ŝtatestroj vizitintaj la Grandan Muron. Pro tio la lokaj aŭtoritatoj donis al la albana ĉefministro honoran atestilon. Beriŝa dankis, komparante la grimpadon kun tiu en la elekto-kampanjo jam komenciĝinta por la ĉi-someraj landaj balotoj.

Bardhyl SELIMI



Nova ekologia vilaĝo

En fora kampara regiono de la graflando Tipperary [tiperejri] (gale: Tiobraid Árann) situas la malgranda vilaĝo Cloughjordan (gale: Cloch Shiurdáin). Antaŭ kelkaj jaroj, la vilaĝo estis kvazaŭ mortonta. Pluraj el la vendejoj kaj komercaj entreprenoj malaperis; diversaj domoj troviĝis en ruiniĝinta stato; la rivereto, kiu fluas tra la vilaĝo, estis tiom malpurigita, ke ĝi aspektis kiel kloako; ne plu estis vilaĝa apoteko, nek loke loĝanta kuracisto; la stacidomo iĝis nura fervoja haltejo, sen stacidomestro aŭ dungitaro; kaj junuloj ne plu trovis laboron en la distrikto.

Antaŭ kelkaj jaroj grupo da homoj el diversaj lokoj kaj diversaj cirkonstancoj kuniĝis por studi la eblon krei ekologian komunumon en Irlando. Intereso pri la projekto kreskis, kaj pli da personoj aliĝis al la grupo. Post esploroj, oni elektis Cloughjordan kiel taŭgan ejon por la iniciato. Kvankam ekologiaj vilaĝoj jam ekzistas en kelkaj landoj, la koncepto estis nekonata en Irlando.

La 21an de marto 2009 estis oficiale lanĉita per Duncan Stewart [donkan stjuart], la plej konata irlanda ekologiisto, la unua fazo de konstruo de la unua ekologia vilaĝo en la Verda Insulo. Kvankam ĝis nun nur tri domoj estas preskaŭ finkonstruitaj, sufiĉe granda nombro da aliĝintoj jam vivas en luitaj loĝejoj en la antikva vilaĝo, atendante la kompletigon de siaj novaj domoj. Eĉ en tiu komenca periodo de la projekto, la ĉeesto de tiuj novaj vilaĝanoj kaŭzis burĝonadon de la unuaj floroj de transformado de Cloughjordan. Oni planas rekonstruadon de la ruinoj kaj kadukaj domoj en la originala vilaĝo; la apoteko denove malfermiĝis; pli da pasaĝeroj uzas la stacidomon; la loka komerco profitas de la novaj loĝantoj; kaj entute,

la ĝenerala etoso de Cloughjordan estas pli optimisma. Anoj de la ekologia grupo establis du novajn entreprenojn sur la antikva ĉefstrato, nome, librejon/kafejon kaj biciklejon, kiuj laŭŝajne prosperas. Ĉiusabate la novaj vilaĝanoj okazigas en la vilaĝa placo subĉielan merkaton de hejmfaritaj kaj loke kultivitaj produktoj. Tiuj novaj loĝantoj, kiuj devenas ne nur de aliaj partoj de la lando, sed inkluzivas ankaŭ kelkajn eksterlandanojn, ne formas apartan komunumon, sed estas plene integriĝintaj en la vivo de la malnova vilaĝo. Tio estas rimarkinda en tre tradicia kaj konservativa socio kiel tiu de la irlanda kamparo. Eĉ pli surprize estas, ke la plimulto estas urbanoj, kiuj ĝis nun ne estis kutimiĝintaj al la kampara vivo.

Tri el ni, kiuj loĝas en mez-irlanda urbo, ricevis inviton por ĉeesti la lanĉon de la unua fazo de la nova domaro. Ni ekveturis tra la trankvila kamparo de la graflando Tipperary, sed ĉar ni ne bone



La 21an de marto 2009 estis oficiale lanĉita per Duncan Stewart [donkan stjuart], la unua fazo de konstruo de la unua ekologia vilaĝo en la Verda Insulo.

konis la terenon, ni iris per la plej longa vojo, kiu konsistis el mallarĝaj serpentantaj ŝoseetoj. La suno brilis, la pejzaĝo estis plaĉa, trafiko mankis, kaj ni havis la impreson, ke ni revenis al la antikva Irlando, kiu ekzistis ĝis la alveno de la



Vilaĝa placo (herbejo).

tiel nomata kaj mallonge vivinta „Kelta Tigro” (prospera konjunkturo), kiu estis mortigita per la aktuala monda ekonomia krizo. La sperto estis nekredeble agrabla. Kiam post longa veturado ni finfine atingis Cloughjordan, ni tuj sentis bonvenigan etoson.

Ĝenerale, irlandaj vilaĝoj ne estas kompareblaj kun la pentrindaj urbetoj en aliaj eŭropaj landoj. La tradicia irlanda vilaĝo precipe konsistas el unu longa strato kun vico da malaltaj dometoj, pluraj etaj trinkejoj kaj vendejoj, kaj preĝejo. Ofte mankas lernejo. Ĉar la lando estis dum jarcentoj tre malriĉa, malmulto distingas tiujn malgrandajn komunumojn, kaj dum la lastaj jaroj multaj suferis de malplanita konstruado de malbelaj modernaj domaroj kaj grandaj komercaj kaj apartamentaj blokoj, kiuj tute ne harmonias kun la medio. Cloughjordan estas tipa kampara vilaĝo, sed feliĉe, tute mankas tiaj signoj de urbanigo kaj misa prikonstruo. Kvankam evidente malriĉa, ĝi prezentas bonvenigan aspekton. Ĝi estas trankvila kaj sentrafika. Kiam ni alvenis, ni estis tuj invitetaj al la komunuma halo de la antikva vilaĝo, kie ni aŭdis diversajn informajn paroladojn kun lumbildaj ilustraĵoj, pri la ekologia projekto. Post la informsesio, kaj vizito al la tereno, kune kun granda amaso da loĝantoj kaj vizitantoj, ni estis regalitaj per abundo da bongustaj sandviĉoj, kukoj kaj aliaj frandaĵoj, teo kaj kafo. De la halo ni revenis al la ĉefstrato, kie la gast-ekologiisto Duncan tondis long-

an girlandon trans la enirejo al la tereno, kie oni konstruas la ekologian domaron. Ni antaŭe supozis, ke tiu verŝajne situus ekster la malnova vilaĝo, sed tute ne veras. Oni eniras per breĉo apud antikva grenejo (kiun oni intencas restaŭri), kontraŭe al la meza placo de Cloughjordan, do la ekologia domaro situas flanke de la antikva vilaĝo, kaj ne apartigita de ĝi. Do en la estonteco ĝi formas integran parton de la malnova vilaĝo. Malnovaj kaj novaj vilaĝanoj estos najbaroj.

Sur la ekologia tereno estas jam konstruitaj la stratoj kaj aŭtomobilaj parkejoj sufiĉe for de la loĝota domaro; ankaŭ la tubaro kaj konektaĵoj. Parto de la grundo estas dividita en parceloj, kie la loĝantoj kultivos legomojn. Ĉirkaŭ ili estas longa vico da diversaj specioj de indiĝenaj irlandaj pomujoj. Apuda farmbieno jam ekzistas. Baldaŭ konstruiĝos pli da domoj, komuna hejta centralo, kaj aliaj publikaj haloj. Jen detaloj pri la ekologia projekto:

La ekologia vilaĝo situas sur 67 akreoj (1 akreo = ĉirkaŭ 40 arojn). Oni intencas konstrui 130 malaltenergiajn loĝdomojn. La komuna varmigsistemo funkcios per sunpaneloj kaj ligneraj hejtfornoj. Poste oni eble instalos ventturbinojn. 50 akreoj estas rezervitaj por parceloj, bieno kaj arbaro. En la vilaĝo estos centro de edukado pri daŭrigebla vivmaniero. Kuna uzado de aŭtomobiloj estos stimulata. La vojoj inter la domoj estos por piedirantoj, ne veturiloj. La rivereto estos purigita, kaj laŭ ĝia bordo

estos borda promenejo kun vicoj da fruktaj kaj nuksaj arboj. Sur la tereno estos apartamentaro, kiu inkluzivos entreprenan centron kaj spacon por terapioj aŭ podetala vendo. La vilaĝo havos fonduson por la provizo de eko-entreprena centro por novaj „verdaĵ” iniciatoj. Strukturo jam ekzistas por provizo de interreta servo. En la regiono troviĝas belaj arbaroj, agrabla agrikultura pejzaĝo, kaj ne malproksime estas la vasta Lough [loch] Derg (gael: Loch Deirgeirt), unu el la plej belaj lagoj en tuta Irlando.

En la malnova Cloughjordan la ekzistantaj domoj estas malgrandaj kaj modestaj, sed la vilaĝoj enhavas tri belajn preĝejojn de malsamaj konfesioj. La plej granda, en la meza placo, havas altegan pintturon, videblan je longa distanco tra la ĉirkaŭaĵo. Entute Cloughjordan estas agrablega loko por la ambicia kaj esperplena iniciato, kiu konsistigas la unuan ekologian komunumon en Irlando.

Parenteze, nia tria filo estas membro de alia grupo, kiu esperas krei en okcidenta Irlando similan, sed pli etskalan kaj malpli pretendeman ekologian komunumon, en kiu la ĉefa komunikilo estos la gaela (irlanda) lingvo. La hodiaŭa Cloughjordan estas angleparolanta vilaĝo, kvankam kredeble, en la pasinteco, la ĉiutaga lingvo estis la gaela. Ni ne scias, kio estos la sinteno de la tiea ekologia komunumo pri la lingva demando (ĉiam tikla afero en Irlando).

Garvan MAKAI



Lago (Lough Derg).



La rivereto estos purigita...

Fino de ramadano: ĉu festo de gejunuloj?

Miloj da islamanoj vestitaj per blankaj tunikoj dum festo fine de ramadano fluas pace kaj ĝoje tra ĉiuj ĉefaj urboj por komuna matena preĝo. En Burundo 90 % de la loĝantoj estas kristanoj kaj 10 % islamanoj, sed dum la festo oni pensus, ke la ĉefurbo iĝis islama.

La celebrado de ĉi tiu festo iĝis tradicia en Burundo ekde la eniro de islamo pere de komercistoj el Zanzibaro, kiuj eniris Rumonge (trans la Tanganjika Lago) por komercaj celoj kaj islamigis tieajn loĝantojn, kiuj poste disvastigis sian religion en ĉiuj regionoj, precipe en la ĉefaj urboj.

La festo fariĝis infana, ĉar por plenkreskuloj, post la matena preĝo, la festo finiĝas. Gepatroj (eĉ el malriĉaj familioj) devas aĉeti novajn vestaĵojn por siaj infanoj kaj multon elspezas por ili dum la festo, aĉetante tre bongustan manĝaĵon kaj donante al ili poŝmonon.

Ĉiuj adeptoj de la islama religio renkontiĝas (frumatene) en elektita loko (en granda urbo) por komuna preĝo, en kiu virinoj, infanoj kaj viroj partoprenas. Post la preĝo okazas grandega festeno, kie ankaŭ kristanoj estas invitataj, kaj tio estas simbolo de paco kaj bona kunekzistado inter la du religioj. Posttagmeze, bonvestitaj kaj belaspektaj junuloj vidiĝas en ĉiuj stratoj kaj vagadas je ĉiuj distraj lokoj (marbordo, kinejo ...). Estas bona festo, sed multekosta por la gepatroj, kiuj devas ŝpari monon por tio. Laŭ informoj de kelkaj gepatroj, en riĉaj familioj la elspezoj por unu infano povas atingi 150 usonajn dolarojn, kaj por malriĉaj kaj mezriĉaj familioj, la elspezo ĉirkaŭas 20-30 dolarojn. Komercistoj



SANDIP DEBNATH

La festo fariĝis infana, ĉar por plenkreskuloj, post la matena preĝo, la festo finiĝas.



UMAR NASIR

La registaro ĵus ordonis, ke la festo estu konsiderata kiel feritago

multon enspezas, vendante multekostajn vestaĵojn kaj manĝaĵojn dum la festo.

La registaro ĵus ordonis, ke la festo estu konsiderata kiel feritago – ordono, kiun multaj personoj kritikis pro la fakto, ke en la nuna burunda kalendaro jam estas multaj ferioj pro mortigo de multaj

gravaj personoj dum la milito; do necesas nuligi kelkajn festojn anstataŭ multobligi ilin, ĉar dum ĉi tiu festo nur 10 % de la loĝantoj festas, kaj la aliaj restas hejme, sen fari ion.

Jérémie SABUYUMVA

La sola nederlanddevena papo

Antaŭ 550 jaroj, la 2an de marto 1459, naskiĝis en Utreĥto Adriaan Florenszoon Boeyens [bujens], filo de ŝipĉarpentisto, kiu poste fariĝis papo Adriano la 6a. Por nederlandanoj li estas la sola nederlanda papo, sed ĉar ankoraŭ ne ekzistis tiuepoke memstara nederlanda ŝtato, por germanoj li estas la sepa germana papo – la nuna Benedikto la 16a estas la oka germana papo –, sed kiel ajn: antaŭ Johano Paŭlo la 2a, papo Adriano estis la lasta ne-itala papo.

Post siaj bazaj studoj Adriano plustudis en Zwolle ĉe la tiel nomataj „fratoj de la komuna vivo”, kies grava eklezia reforma movado, la *moderna devoteco*, influis grandan parton de okcidenta Eŭropo, precipe en la urboj de la internacia Hanso. Tiu devoteco estas kristana spiriteco, bazita sur regula legado en la biblio kune kun tute internigita devoteco en la praktika ĉiutaga vivo. Unu el la plej famaj verkoj el ilia mezo estas *Imitado de Kristo*¹ de Tomaso a Kempis. Poste Adriano studis teologion en Loveno, kie en 1490 li fariĝis profesoro. Erasmo (ankaŭ edukita en la rondoj de la Moderna Devoteco) fariĝis tie unu el liaj studentoj.

Kiam la aŭstra arkiduko, samtempe imperiestro de la germana regno, Maksimiliano, serĉis edukonton por sia nepo Karolo, li elektis Adrianon: en 1507 li do fariĝis la pedagogo de la estonta imperiestro Karolo la 5a. En 1512 Karolo (nur 12-jara) faris lin kortegano, kelkajn jarojn poste sendis lin al Hispanio, por tie organizi la transdonon de la heredaĵo de la hispana reĝo Ferdinando al Karolo. Surloke, en Hispanio, Adriano en 1516 fariĝis episkopo, poste kardinalo laŭ peto de Karolo. Iom poste Karolo

persone ekreĝis en Hispanio, sed jam baldaŭ poste li forlasis la regionon – la germanaj landoj liajuĝe estis pli gravaj. Adriano fariĝis lia vicreĝo. En 1522 atingis Adrianon la neatendita sciigo, ke oni elektis lin papo en Romo. Post la morto de Leono la 10a (el la renesanca familio Medici), la politikaj komplikaj inter Francio unuflanke kaj la Germana Regno kaj Anglio aliflanke kondukis al ĉi tiu politika „eksterulo”, kiel plej akceptebla kandidato.

Barbaro el la nordo

Adriano estis tre sobra persono, ne aprezis la renesancan abundon de la papa kortego, ĉiutage celebris la meson (kio tiuepoke certe en Romo ne estis kutimo), kaj estis spertata kiel „barbaro el la nordo”. Li klopodis reformi la kurion, forigante riĉajn prebendojn². La financoj de la papa ŝtato estis en mizera stato, pro la gigantaj konstru-elspezoj de la antaŭuloj. Restas korespondaĵo lia kun Erasmo, en kiu li sensukcese petas ties helpon en la gigantaj problemoj, kiujn li frontis. Li faris same senrezulte sian eblon por formi kunlaboron politikan inter la eŭropaj imperiestroj, reĝoj, dukoj, grafoj k.s. por kontraŭbatali la turkojn, kiuj – ĝuste pro tiu intern-eŭropa malkordo – senprobleme konkeris Beogradon kaj Rodon. Eĉ Italion ili nun povos minaci, li timis³.


Koncerne la Reformacion, Adriano postulis de Lutero senhezite rekoni la aŭtoritaton de la eklezio de Romo kaj de la papo, sed aliflanke li klare esprimis la kulpon de Romo, de la papoj, de la kurio pri la misaĵoj, kiuj kondukis al la agado de Lutero. La tiutempaj instancoj en Romo kaj aliloke ne bone komprenis

tiun sintenon ĉe *papo!* Nur papo Johano Paŭlo la 2a en sia jubilea jaro 2000 sekvis Adrianon la 6an koncerne tiun kulpokonfeson.

Adriano mortis la 14an de septembro 1523, malsana, sola, primokata, malamata. Nuntempe liaj restaĵoj ripozas en monumenta tombo en la preĝejo *Santa Maria dell' Anima* en Romo. Sur ĝi estas devizo: „Kiom gravas, kiumomente eĉ la pleja virta persono vivas.” Nur mal multe da turistoj aŭ pilgrimoj trovas tiun ĉi preĝejon.

Gerrit BERVING

1. Haveblas traduko ĉe FEL.
2. Enspezoj de ekleziuloj, ligitaj al fojfoje nur honoraj taskoj.
3. Erasmo ankaŭ verkis libron pri la demando, ĉu oni devas aŭ ne milite ataki la turkojn.



Imitado de Kristo Tomaso a Kempis.

Prezo ĉe FEL:
11.90 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de FEL, Frankrijk 140, BE-2000 Antwerpen.

www.retbuto.net
retbutiko@fel.esperanto.be

La vatikana ŝtato celebris la okdekan naskiĝdaton

Kun surfaco malpli vasta ol duonkvadrata kilometro, la „Lando de la Vatikana Urbo” estas la plej eta ŝtato de la mondo. Spite de plurjarcenta tradicio, ĝia naskiĝo relative freŝdatas. Ĝi fakte estis sankciita la 11an de februaro 1929, sed ĝiaj historiaj antaŭradikoj profundigas en la politikajn eventojn de la dek-naŭa jarcento.¹

La 20an de septembro 1870, dum la papŝtataj aŭtoritatuloj laŭinterkonsente atendis siajn kolegojn de la itala registaro por interparoli pri ĉiuj detaloj, la piemontaj trupoj eniris Romon kaj okupis ĝin tutan krom la *Leona Urbo*² plus la najbaraj Vatikana Monteto kaj Kastelo Sankta Anĝelo, laŭ la unua artikolo de la kapitulaco, subskribita je la 15a samtaga horo ĉe Vilao Albani. Sed la postan tagon la papa generalo Kanzler, proprainiciate kaj ŝargite de la Sankta Seĝo, petis kaj akiris, ke la piemontaj trupoj okupu ankaŭ la Leonan Urbon, ĉar ĝi ne plu estis ŝtate prizorgebla, sekve, laŭfakte, preskaŭ nenies teritorio.

La papo prizonulo en Vatikano

De tiam Pio la 9a, la tiama papo, sin konsideris prizonulo kaj, enfermita en la tiel nomataj apostolaj palacoj, ne plu eliris el Vatikana Monteto: lia teologia *non possumus* (ni ne povas) pri la problemo kapabli disponi pri la teritorioj de la Sankta Seĝo (nome la papo konvinkiĝis, ke li ne rajtas cedi al aliaj teritoriojn de la eklezio, kaj des malpli la urbon Romo mem), kombiniĝis kun lia kondamno de la kontraŭjura agado de la italaj politikistoj. Kio ne estis kaj ne povis esti komprenita tiam, nome ke la Sankta Seĝo, liberiĝinte el kompromisoj de tera potenco, favoriĝus ene de mal-

multe da jardekoj je nova printempo de religiaj energioj kaj spirita fermentoj, komencis realiĝi nur en la unuaj jardekoj de la dudeka jarcento.

Io sin movis post la breĉo de *Porta Pia*³: en la tujposta jaro 1871, ne senkontraste, la itala parlamento aprobis la leĝon de la tieldiritaj Garantioj al la papo: estis rekonataj la suverenecaj rajtoj kaj prerogativoj, kiaj akreditigo de diplomataj reprezentantoj, la rajto trakti kun eksteraj ŝtatoj, la senkontrola uzo de poŝtaj kaj telegrafaj servoj, la eksterteritorieco de la vaticanaj palacoj kaj Laterano kun la Vilao de Kastelo Gandolfo, plus ĉiujara monkompenso de 3 250 000 liroj. Krome la itala ŝtato rezignis kiun ajn entrudiĝon en ekleziajn aferojn, rezervante al si nur la rajtigon al jesa aŭ nea ekzekucio de papaj dokumentoj kaj entrudiĝo en la elekto de la episkopoj. Sed la papo rifuzis kaj la leĝon kaj la monkompencon, kaj ekziliĝis en Vatikano malpermesante al la katolikoj partopreni en la publika vivo.

Sesdek jarojn la „Roma Problemo” skrapĉizis la civilan kaj religian vivon de la italoj, reĝo kaj papo kunloĝis en Romo ignorante unu la alian, almenaŭ nivele de oficialeco.

Politika solvo

Diversaj homoj, politikaj kaj ekleziaj, provis konduki la du regantarojn al ronda tablo, sed la reĝo ne volis rezignion teritorian kaj la papo ne perdi ion sendependecan. En tiu afero, fine, sukcesis Mussolini, la faŝista diktatoro, kaj li atingis bonan rezulton en 1929, kiam la 11an de februaro flanke de itala ŝtato estis pakte rekonita la suvereneco de la Sankta Seĝo sur la eta teritorio kaj kon-



Celebra poŝtmarko.

kordate normigitaj la rilatoj inter la eklezio kaj ŝtato. Kial la faŝisma Duĉo, kiu dum faŝista kongreso de 1919 jam adresis „firman inviton al lia Sankta Moŝto forpeliĝi el Romo”? Jen lia provo motivi la novan politikan kurson: „La latina kaj imperia tradicio de Romo hodiaŭ estas reprezentata de katolikismo.”

Tiel naskiĝis la pakto, kiu establis la plej etan ŝtaton de la mondo, kies reganto herede jam trakuris preskaŭ du mil jarojn, kaj kiu ĉi-jare celebras sian okdekjariĝon, post kiam plurfoje, eĉ en duonpublikaj deklaroj, li montris, ke tiu suferiga evento de la 20a de septembro, tiom celebrata per stratdediĉoj tra tuta Italio, liberigis la katolikan eklezion el peza interplektiĝo, kiu jam delonge ĉesis ĝin protekti.

Armando ZECCHIN

1. Oni ne forgesu, ke temas pri epizodo en la tiel nomata *Risorgimento* aŭ „Restariĝo de Italio”, inter la Kongreso de Vieno, 1815, kaj la oficialiĝo de la itala unueca ŝtato en 1870. El pluraj ŝtatoj, parte reĝlandoj aŭ rektaj heredantoj de la renesancaj respublikoj, tiam formiĝis Italio en preskaŭ sia nuna formo. Dum tiu unuiĝa procezo ankaŭ la sufiĉe ampleksa eklezia ŝtato de la papoj estis englutita en la politike tre miksita movado. Rezulte Italio fariĝis reĝlando sub Viktoro Emanuelo la 1a.

2. Rempara parto de la nuna Vatikanurbo.

3. Pordego en la tiel nomataj Aŭreliaj Remparoj de Romo, konstruita de Michelangelo; dum la konkero de Romo en 1870 la trupoj pafis breĉon en ĝin, kio simbole finis la papan regadon.

Gvidlibro por ksenofoboj

Ofte naciaj stereotipoj havas ian bazon en la realo. Kaj ofte eksterlandano povas vidi ion pli bone, ol la homoj, kiuj ĉiutage vivas en iu medio, kaj al kiuj ĉio en ĝi ŝajnas mem-evidenta.


La libreto *Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj* prezentas Nederlandon en moketa, sed simpati-plena maniero. Iuj priskriboj konformas al antaŭjuĝoj. Ĉu nederlandanoj estas tiom ŝparemaj, kiel oni kutime diras? Jes, senhezite respondas la aŭtoro, ne riproĉe, sed simple post honesta observado.

Tiu stereotipo estas konata. Tamen aliaj asertoj en la libro estas multe pli surprizaj. La aŭtoro asertas, ke „frue en aŭgusto eblas observi alian surloke naskitan ŝatokupon – stangosidadon. Viroj sidas sur stangoj en la Norda Maro, ĝis ili defalas. Venkas la lasta falinto.” Ĉu vere estas tiel? Jes, je mia surprizo, kaj la lasta konkurso daŭris 72 horojn.

La aŭtoro Rodney Bolt naskiĝis en Sud-Afriko kaj loĝis en Grekio, Anglio kaj Germanio antaŭ ol fine atingi Amsterdamon. Liaj spertoj en multaj landoj sendube kontribuis al la sagaceco kaj vikleco de liaj rimarkoj. La traduko de Simon Davies estas bona, kaj la eldono de eldonejo Bero estas simpla sed plaĉa.

Mi bedaŭras, ke mi ne legis la *Ksenofobian gvidlibron al la japanoj* antaŭ la Universala Kongreso en Jokohamo, kaj mi esperas, ke eldonejo Bero havos la bonan ideon eldoni tradukon de *Ksenofobia gvidlibro al la poloj* okaze de la kongreso en Bjalistoko. Kaj mi rimarkas, kun scivola timo, ke ekzistas ankaŭ *Ksenofobia gvidlibro al la kanadanoj*!

Yves BELLEFEUILLE



Rodney Bolt: *Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj*.

El la angla tradukis Simon Davies. Eld. Bero. 62 paĝoj kudre binditaj.

Prezo ĉe FEL: 6 eŭroj + afranko.

Laŭdinda maskita faksimilo

La unua vorto de mia titolo estas adjektivo. Se nia presisto miskorektis, bv. restaŭri! Plej grava karakterizo de la nova vortaro estas ja, ke ĝi estas laŭdinda. Laŭdinda, ĉar bezonata. Laŭdinda, ĉar bona. Estas eksterdube, ke ĝi iĝos la baza vortaro por germanoj, dum deko aŭ dekoj da jaroj. Ne ĉiu germano tuj estas sufiĉe pagipova por havigi al si la Kraŭsojn.

Vera poŝvortaro ĝi ne estas: mi ne trovis en iu el miaj jakoj sufiĉe vastbuŝan poŝon, sed mi ja ne estas politikisto (ili havas multe pli vastajn poŝojn!). Laŭdinde estas, ke ĝi estis eldonita de konata neesperanta eldonejo. Strange, kaj verŝajne laŭdinde, ke la germanoj ŝajnas sufiĉe facile sukcesi interesigi eldonejojn, almenaŭ por vortaroj.

Faksimilo?

Mi komparis la novan libron kun la *Weltsprachenwörterbuch* de Weidmann (el Svislando, 2003) kaj konstatis, je mia miro, ke la diferenco inter la verkoj estas kvazaŭ nula. Nu ja, ankaŭ la nova libro citas, kiel duan nomon, Weidmann kaj eĉ atentigas pri la fakto, ke la bazo de la libro estas la eldono de Weidmann. La svisa, tamen, aspektas broŝuro (kaj estas multekosta), dum la nova estas vera, eĉ modela (nuntempe tre malofte), bele bindita kaj durkovrila libro. Se vi estas masohisto aŭ ĝisosta apogemulo de Esperanto (tio ne estas la sama), vi nepre aĉetos ambaŭ. En la nova eldono, tamen, kelkaj prezeraroj de la sviso estas korektitaj (kaj, verŝajne, novaj enkondukitaj), sed fojfoje ĝena formo restis („pseŭdonomo” apud „pseŭdonimo”). „Kelnerino” malaperis kaj estas

anstataŭita de „kelnero”. Aperis „Schlesien” (Silezio) kaj „Schleswig-Holstein” (Ŝlesvig-Holstinio). En la enkonduko la aŭtoro anoncas enkondukon de pluraj aktualaj nocioj, sed ili ne estas multaj kaj ankaŭ ne mondmirigaj: „fajnaj polveroj”, „grapobombo” (temo de multaj diskutoj en Interreto), „blogo” (neologisme, sed tutmonde ĉiezumante) kaj „retbabili” (tute natura naskitaĵo).

**Mi supozas kaj esperas,
ke baldaŭ ĉiu germana
esperantisto posedos
minimуме unu ekzempleron
de la libro ...
sed ke ili samtempe bone
konscias, ke ĝi
ne anstataŭas la Kraŭsojn!**

Ekvilibro

La germana-esperanta parto ampleksas 126 paĝojn, la alidirekta 117. Klaras do, ke la esperanta parto entenas multe da kunmetaĵoj. En mia juneco oni ĉiam zorgis, ke la esperanta parto estu multe malpli ampleksa ol la nacilingva, por argumenti, ke en Esperanto oni bezonas multe malpli da bazaj vortoj. Tamen ankaŭ en la germana parto estas relative multe da kunmetaĵoj. La esperantaj ofte dankas sian enprenon al la germana traduko: „aerdefendkanono” = „*Flak*”. Mi supozas, ke la aŭtoro uzis inversigan programon. Estas interese, ke (malofte en niaj vortaroj!) aperas indiko de la



genro de la substantivoj ... sed tiam mi, negermano, ŝatus, ke aperu ankaŭ la pluralformoj.

Recenzista vitrioleteto

Ĉar mi timas, ke oni ne konsideros min serioza recenzisto, se mi ne trovas mankojn, mi klopodos trovi ilin. Pro la koncizeco nur la ĉefsignifoj de la vortoj estas traktitaj, sed precipe ĝenas min, ke, malgraŭ kontraŭa mencio en la enkonduko, absolute mankas eĉ la plej kutimaj esprimoj. Oni ankaŭ povas diskuti pri la utilo de la dis-part-ig-o de la vortoj en la Esperanto-parto, sed nepre estas tiom da por-ul-oj, kiom da kontraŭ-ul-oj.

Mi supozas kaj esperas, ke baldaŭ ĉiu germana esperantisto posedos minimume unu ekzempleron de la libro ... sed ke ili samtempe bone konscias, ke ĝi ne anstataŭas la Kraŭsojn!

Petro DESMET'

Ulrich Matthias / Dietrich M. Weidmann: *Kleines Wörterbuch Deutsch-Esperanto, Esperanto-Deutsch*. Eld. Marixverlag, Wiesbaden, 2008. 255 paĝoj kudre binditaj. ISBN 978-3-86539-182-7.

Prezo ĉe FEL: 7,95 eŭroj + afranko.


Lingvofamilio, kiu ne ekzistas

La titolo de la libreto estas misnomo, implicanta, ke ja pravigeblas filologia kungrupigo de la keltaj lingvoj kune kun la semidaj lingvoj. Tamen, ajna ideo, ke tiuj du grupoj havas komunan genealogian fonton, estas defendata de neui serioza nuntempa lingvisto.

Tion nek celas, nek opinias Cherpillod. En la ĉefa parto de sia verko li elmontras liston de 40 punktoj pri simileco inter la du lingvogrupoj. Laŭ la verkinto, pri tiaj konverĝoj „estas nesupozeble, ke ili ĉiuj estus kaŭzataj de simpla hazardo” (p. 124). Sed poste, ekzameninte la leksikon de la du grupoj, li konkludas, ke pro relativa manko de tieaj komunaj elementoj ne povas temi pri genealogia rilato.

Li starigas, do, konkludan demandon pri tio, kiuj historiaj okazaĵoj povus klarigi tian situacion. Kiel solvon li subtenas la teorion de la munkena profesoro Theo Vennemann, ke influo de antikvaj kaj nun malaperintaj parolantoj de semidaj lingvoj en Eŭropo okazigis trajtojn en la iam najbaraj aŭ anstataŭontaj keltaj lingvoj.

Sed ĉu la atestaĵoj vere sufiĉas, por fari tian konkludon? Kelkaj el la 40 punktoj de Cherpillod ŝajnas al mi malfortaj, ekzemple, lia punkto 10: familinomoj havas la formon „filo de ...”. Cherpillod asertas, ke tiu kutimo ekzistas en malmultaj aliaj lingvoj (p. 47), menciante kiel solan alian ekzem-



**Ĉi tiu verko estas bona
komencopunkto
por iu, kiu volas esplori
konsiderindan serion
da koincidoj inter
la du lingvogrupoj
(la keltaj kaj la semidaj),
eĉ se ĝia aŭtoro
jam decidis
sian opinion.**

plon la skandinavajn lingvojn. Tio simple ne estas vera, kaj cetere, temas ne pri lingva eco, sed kultura. Tra la mondo oni povas trovi tiun kutimon: hungaraj nomoj kiel Pálfi (*fi, fu* = „filo”) kaj azerbajĝanaj kaj turkaj nomoj, finiĝantaj per *-oglu* (= „filo”), tuj venas en la kapon. En la kartvela nomo Ioseb Besarionis Dze Ĝugaŝvili (la naskonomo de Stalin) estas eĉ du tiaj patronimaj komponantoj (*dze* = „filo”, *ŝvili* = „ido”). Do, ĉu unika konverĝo, kie ne povas roli hazardo? Ne.

Simile dubindaj estas iuj aliaj pretendataj konverĝoj (ekzemple, pri la malkutimeco de ingenra finaĵo „-a” (punkto 8) kaj plurala finaĵo „-n” (punkto 12)), kaj almenaŭ unu punkto (20: adjektivo post la substantivo) estas atendebla, se ne universala, sekvo de alia trajto jam menciita (18: posta determinado, t.e. kapvorto en la komenco, male al Esperanto).

Tamen, eĉ se oni povas forhendi proporcion de la punktoj, ja restas ankoraŭ konsiderinda serio da koincidoj inter la du lingvogrupoj. Tute fascina temo. Ĉi tiu verko estas bona komencopunkto por iu, kiu volas esplori ĝin, eĉ se ĝia aŭtoro jam decidis sian opinion.

Ed ROBERTSON

André Cherpillod: *La kelt-semidaj lingvoj*. Eld. La Blanchetière, Courgenard, 2008. 143 paĝoj. ISBN 2906134791.

Prezo ĉe FEL: 12 eŭroj + aŭfranko.

anoncetoj

Sur Interreto aperis **La Teorio pri Ĉio**, vivoverko de Manuel Halvelik, je la adreso www.sotragogismo.net. Ĝi estas senpage elŝutebla, sed ege ampleksa.

La **Deklingva manlibro pri politiko** de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono. Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, butiko@fel.esperanto.be kontraŭ 9,50 eŭroj + afranko.

VizituIpernity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 1700 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 lhász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto

Edwin de Kock

Sub Fremdaj Ĉieloĵ

“Nekutime leginda verko”

Donald Broadribb



Ne nur poezio estas en la libro ... enestas, kompreneble, liaj “Lastaj poemoj” sed ne malmultaj scios ke post tiuj “lastaj” li jam verkis sufiĉe multe da postlastaj, kaj iuj el inter tiuj ankaŭ estas troveblaj en tiu ĉi honora kompilaĵo. Tre legindaj estas i.a. nepre la eseoj pri la historio de Esperanto en Sud-Afriko, pri la memorindaj personoj kiujn Edwin renkontis en kaj ekster la verda mondo.

Sed... prefere malkovru mem!

Paĝoj: 288; Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2008

Serio Stafeto n-ro: 32

Pezo: 333 g

ISBN: 978-90-77066-33-1

Prezo ĉe FEL: 22,50 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be